


Brazila Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

113-a jaro - N-ro 362 - Aŭgusto 2020



STALIN



GANDHI



THATCHER



PINOCHET

La politika kompaso

Paĝo 1

Intervjuo
Paĝo 4

**Poezio
Tut'libera**
Paĝo 7

**Nia literatura
panteono**
Paĝo 9

**La cignokanto
de l' poeto**
Paĝo 10

Brazila Esperantisto

Nacia kaj Internacia Kulturo
113-a Jaro • N-ro 362 • Aŭgusto 2020



Kovrilo: Evandro Avellar

Enhavo

- 01 Ĉefartikolo** La politika kompaso
- 03 Movado** 13-a Gaŭĉa Renkontiĝo de Esperanto
- 04 Intervjuo** Paulo Sergio Viana
- 05 Lingva angulo** Kiel plibonigi vian prononcon
- 06 En la Reto** Bildkartoj - Vinilkosmo - UEA.facila
- 07 Esperantisto** Poezio Tut'libera
- 08 Kafaŭzo** Kio, kiam, kie
- 09 Literaturo** Nia literatura panteono
La cignokanto de l' Poeto
- 12 Letero de Nordoriento**

Enkonduko

La Lingvo Internacia burĝonis kaj kreskis dum unu el la plej frenezaj jarcentoj de la ĵusa okcidenta historio. En ĝi okazis senprecedencaj militoj, revolucioj, kulturaj kaj moraj ŝanceliĝoj.

Kompreneble, ankaŭ Esperanto estis kaj estas influata multflanke de tiaj ideoj. Tiu, kiu atente studas nian historion, bezonas scii pri la monda fono por kompreni la rolon de SAT, la laboristan movadon, la malpermesojn en Portugalujo kaj Germanujo dum la 30-aj jaroj, la persekutojn kaj murdojn en sovetaĵ landoj, la apogon de UN kaj tiel plu. Ĉio estas historio. Ĉie estas ideoj.

Nia BE restas fidela al la internaciisma ideo de Zamenhof, unu el la pensuloj de tiu epoko, kaj per siaj artikoloj penas disvolvi kaj vekti la klerigon de siaj legantoj.

Ni esperas, ke ĉi tiu numero iel helpos renovigi vian idealon kaj plifortigi vian homaranisman senton, por fruktodona laboro favore al nia afero.

Sincere deziras,
La redakta skipo



Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo
Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
113-a jaro, N-ro 362, Aŭgusto 2020

Eldona Stabo

Ĉefredaktisto: Cicero Gabriel C. Soares
redakcio@esperanto.org.br

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Cicero Soares, César Dorneles, Paulo Sergio Viana,
Fernando Pita, Esperantisto de Nordoriento

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Evandro Avellar kaj Allan Argolo

Revizio kaj tradukado: Josenilton kaj Miguel Bento

Kontribuoj kaj mesaĝoj sendu al la ĉefredaktisto: redakcio@esperanto.org.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem



Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907

Sidejo: SDS-Bloco P36-Salas 301/303-Ed. Venâncio III
CEP 70393-902 Brasília, DF
Telefona: (0xx61) 3226-1298

Retadreso: bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo: www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto: Evandro Avellar

Financdirektisto: Fernando Maia Jr. Kasisto: Sônia Maria A. Lucio

1-a Sekretario: Rodrigo Tavares P. De Medeiros 2-a Sekretario: Leandro Oliveira Freitas

3-a Sekretario: Márcia Maria C. Avellar

Kontrola Konsilantaro

Eurípedes A. Barbosa, Darci Sardinha, Maria Das Dores Goes

Komitatano-A

Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr.

Ĉefdelegito de UEA

Alex Sousa Santos

Revunkunlaboraĵoj: La ĉefredaktisto rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajton: **1-e:** ne sciigi la ricevon; **2-e:** ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** ne garantii la publikigon; **4-e:** mallongigi tekstojn tiam, kiam necese; **5-e:** ilin reviziigi laŭ ortografio, gramatiko kaj fakvortoj. **a)** Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, de Bertilo Wennergren. **b)** La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2020) oni aparte klarigu per piednotoj aŭ glosaro. **c)** Ni uzos esperantigitajn ŝtato-nomojn kaj urbo-nomojn trovitajn en <http://vortaro.esperanto.org.br>. **d)** Ĉiam kiam eblas ni uzos simplajn vortojn kompreneblajn kaj konstruitajn surbaze de la krea kapablo de Esperanto anstataŭ la novaj radikoj (neologismoj) laŭ <http://bonalingvo.net/> **e)** Ni uzos la sistemon -UJO por landnomoj laŭ la fundamentaj reguloj de la lingvo (kiujn oni eltiras el la libreto La Fundamento de Esperanto).

Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustraci kaj apartenas al la posedantoj.

Anonctarifoj: Tabelo pri prezoj de anoncoj en *Brazila Esperantisto*, laŭ paĝonoj.

tutpaĝa (18x25cm)
4-a kovrilo
R\$ 900,00 (kolora)
3-a kovrilo
R\$ 600,00
(nigra-blanka)

1/2 duonpaĝa
(9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-
blanka)

1/3 trionpaĝa
horizontale
(18x8cm) R\$ 300,00
(kolora)
R\$ 200,00 (nigra-
blanka)

1/3 trionpaĝa
vertikale
(5,8x24cm)
R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-
blanka)

1/6 sesonpaĝa
(5,8x12cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-
blanka)

La politika kompas

Cícero Soares

Ĉu la difinoj "dekstrulo" kaj "maldekstrulo" estas sufiĉaj por subteni politikan diskutadon?



Stalin



Gandhi



Thatcher



Pinochet

MALDEKSTRE

DEKSTRE

La nuntempaj diskutoj inter la nomataj dekstruloj kaj maldekstruloj en Brazilo ofte naskadas miskomprenojn kaj eĉ malamikecojn.

Eble la aferoj iĝus pli klaraj per pli bonaj kriterioj por takado de la pensmanieroj kaj sintenoj. Okazas, ke la tradicia modelo maldekstra-dekstra, laŭ horizontala linio, ne montriĝas sufiĉa por ampleksi ĉiujn detalojn de la demando.


Ni povas loki sur la maldekstran flankon de tiu linio, ekzemple, homojn kiel Stalin, Maŭ Zedong kaj Pol Pot, ligitajn al ekonomio tute regata kaj reguligata.

Socialistoj kiel Gandhi lokiĝus sur pozicio pli modera. Margaret Thatcher sidus malproksime sur la dekstro, pro sia defendo al ekonomio regata nur de konkurenco inter individuoj kaj inter organizaĵoj, sub malmulta interfero de la registaro. Sed tamen eĉ pli dekstre situus granda defendinto de la libera merkato, nome la Generalo Pinoĉeto.


Tiuj ekzemploj tamen konsideras nur la ekonomiajn aspektojn, sed ankaŭ la socia dimensio gravas en politiko. La usona aktivisto David Nolan aldonis plian akson al tiu grafikaĵo - tiun de la persona libereco. Kelkaj institucioj kopiis kaj plibonigis lian modelon. Ili reprezentis per vertikala akso la politikajn poziciojn laŭ socia vidpunkto, montrante la gradon de enmiksiĝo de la

ŝtato en la personan vivon de la civitano.

La aldono de tiu dimensio riĉigas la bildon: la apogantoj de persona libereco ekstrema (liberecanoj), en la suba pinto de la vertikala akso, kaj tiuj kiuj kredas, ke la ŝtata aŭtoritato devas esti obeata super individuaj demandoj (aŭtoritatismaĵ), sur la alia pinto de la akso.



Sur la horizontala linio ekonomia, komunismo starus sur la maldekstra fino, kaj la novliberalismo, sur la dekstra. Sammaniere, laŭ la vertikala akso, montrante la plejan enmiksiĝon de la registaro en la socialajn aferojn, pinte starus la faŝismo; kaj sur la alia flanko, ties malo, la anarkiismo - minimuma registaro, maksimuma libereco.



Mao Zedong



Persona informo

Naskonomo 毛澤東

Naskiĝo 26-an de decembro 1893
en Shaoshan, Dinastio Qing

Morto 9-an de septembro 1976 (82-jara)
en Zhongnanhai

Mortokialo korinfarkto

Tombo Mausoleum of Mao Zedong

Lingvoj Ĉina lingvo • Nordĉina dialekto • hunana lingvo

Loĝloko Zhongnanhai

Ŝtataneco Ĉina Popola Respubliko • Respubliko Ĉinio • Dinastio Qing

Alma mater Dongshan Senior High School • Xiangxiang First Senior High School • The First High School of Changsha, Hunan • Hunan First Normal University

Fonto: <https://eo.wikipedia.org/>

Margaret Thatcher



Persona informo

Naskonomo	Margaret Hilda Roberts
Naskiĝo	13-an de oktobro 1925 en Grantham
Morto	8-an de aprilo 2013 (87-jara) en The Ritz London
Mortokialo	apopleksio
Tombo	Royal Hospital Chelsea
Lingvoj	angla lingvo
Ŝtataneco	Unuiĝinta Reĝlando • Unuiĝinta Reĝlando de Granda Britio kaj Irlando
Alma mater	City Law School • Kesteven and Grantham Girls' School • Somerville College • Universitato de Oksfordo

Augusto Pinochet


Prezidento de Ĉilio



Persona informo

Naskonomo	Augusto José Ramón Pinochet Ugarte
Naskiĝo	25-an de novembro 1915 en  Valparaíso, Ĉilio
Morto	10-an de decembro 2006 en  Santiago de Chile, Ĉilio
Mortis pro	korinfarkto ^[#]
Religio	katolikismo ^[#]
Lingvoj	hispana lingvo ^[#]
Loĝloko	Valparaíso ^[#]
Ŝtataneco	Ĉilio ^[#]
Alma mater	Instituto Rafael Ariztía de Quillota • Colegio de los Sagrados Corazones de Valparaíso • Bernardo O'Higgins Military School • Universitato de Ĉilio ^[#]

Mohandas Karamchand Gandhi



Gandhi en Sudafriko

Persona informo

Naskonomo	Mohandas Karamchand Gandhi
Naskiĝo	2-an de oktobro 1869 en Porbandar
Morto	30-an de januaro 1948 (78-jara) en Gandhi Smriti, Delhio,  Dominio de Barato
Mortokialo	pafvundo
Tombo	Raj Gat
Lingvoj	guĝarata lingvo • hindia lingvo • angla lingvo
Loĝloko	Londono • Barato • Sud-Afriko
Ŝtataneco	Brita Hindio • Dominio de Barato
Alma mater	Alfred High School • Ena Templo • Universitato-Kolegio de Londono • Universitato de Londono

Fonto: <https://eo.wikipedia.org/>

Aldone de la sociala akso, la grafikaĵo nun montras, ke Stalin estis maldekstrulo aŭtoritatista (la ŝtato estas pli grava ol la individuo), kaj Gandhi, kredante je la superega valoro de ĉiu unuopulo, estis maldekstrulo liberalisma. Stalin trudis kolektivismon arbitran regatan de la ŝtato, tial li prezentiĝas en la supra maldekstra kvarono de la grafikaĵo. Tamen Gandhi situas en la malsupra maldekstra kvarono, defendinta volontulan kolektivismon laŭ regiona nivelo, sen enmiksiĝo de la registaro.

En la sama dekstra flanko nesocialisma (laŭ la ekonomia linio), ni povas rimarki la vertikale longan distancon inter Pinoĉeto kaj la anarkiismo liberalisma de la filozofino Ayn Rand, la kreinto de la filozofia sistemo Objektivismo kaj aŭtoro de verkoj semoriĉaj kiel Atlas Shrugged (Atlaso Ŝultrolevis) kaj The Fountainhead (La Elfluejo).

Malgraŭ la populara misa opinio, la grafikaĵo montras sendube ke la kontraŭo al faŝismo, rilate al la individua libereco, ne estas komunismo, sed anarkiismo. Stalinistoj amasbuĉis anarkiistojn (kaj esperantistojn!) dum la pasinta jarcento.

Aliflanke, la kontraŭo ekonomia al komunismo (iu

ekonomio tute planata de la registaro) estas la novliberalismo (iu ekonomio plene libera de ŝtata reguligado). Kiam ni ignoras la ekonomian akson, ni konstatas la mitan ideon, ke aŭtoritatismo estas dekstrisma. Tamen se Hitler kaj Stalin kunsidus, evitantaj la ekonomian flankon de la afero, ili havus multan komunan terenon por kunpromeni. Ĝuste pro tio la anarkiistoj-sindikatiistoj, socialistoj-liberecanoj, restas en la ekstrema malsupro de la grafikaĵo, sed je maldekstro tre for de Ayn Rand.

Kaj vi, kie vi situus en ĉi tiu grafikaĵo? Kelkaj retpaĝoj proponas demandarojn por diveni vian politikan pozicion. La plej konataj - sed anglalingve - estas nolanchart.com kaj politicalcompass.org. La plej praktika kaj rapida estas theadvocates.org.

Same kiel ĉe aliaj ĉi-specaj testoj, neniuj povas ne kalkuli je mistraĵoj dum la analizado de viaj respondoj. Sed la proponata ampleksigo de la kriterioj jam helpas liveri novan rigardon al la afero. Ni ne plu bezonas nin kateni al la ordinara funela dekstra-maldekstra konduto. Ni jam pli amplekse povas taksi la diskutantojn dum disputoj en sociaj retoj. ■

13º Encontro Gaúcho de Esperanto 14/12 2019 9h
13-a Gaúča Renkontiĝo de
ESPERANTO

Imagem: by rawpixel.com - www.freepik.com

Tema: A ALEGRIA DE SER ESPERANTISTA
Temo: LA ĜOJO ESTI ESPERANTISTO

Local: Clube de Cultura
Rua Ramiro Barcelos, 1853
Porto Alegre - RS - Brasil

REALIZAÇÃO:
Associação Gaúcha de Esperanto
Zamenhofa Tago

CLUBE DE CULTURA
EM DEFESA DA CULTURA

Informações:  (51) 99797-3897 | gea.esperanto@gmail.com

César Dorneles

La 14-an de Decembro 2019 okazis la 13-a Gaúča Renkontiĝo de Esperanto, sub la temo La ĝojo esti esperantisto, en Porto-Alegro, ĉe Clube de Cultura. La evento okazis sub la aŭspicioj de Gaúča Esperanto-Asocio, kaj de 2017 la asocio klopodas plurealigi ĝin pli regule.

Matene Miguel Rocha Bento parolis pri Video-babiladoj en Esperanto. Ŝercado per heliumo kaj Ateliero pri pripentrado de T-ĉemizoj realiĝis sub la respondeco de Eugenio Carlos Gallichio Hansen. Lenio Marobin, el Laĵeado (RS), parolis pri Vivspertoj en Anglio, helpe de projekcio de belaj fotoj pri tiu lando.

Kunfratiĝa tagmanĝo estis oportuno por festi la Zamenhof-Tagon.

Dum la posttagmezo, Euleax de Lima Pereira sin okupis pri la temo Enkonduko en neŭrodiverĝecon kaj aŭtismulan fiermovadon. Arta Momento sekvis pere de

deklamado de poeziaĵoj: Miguel Rocha Bento prezentis i.a. sian poemon Jardeko, kiu akiris la unuan lokon - kategorio Esperanto - en la konkurso Poesie en Liberté (Poezio Tut'libera), kulturaranĝo de la franca registaro.

Cleonice de Lima Rodrigues kaj Gilberto Henrique Buchmann rakontis anekdotojn. João Nicolau Aloisio, kursfininto de baza kurso, kantis unu el la Esperantaj versioj de Sankta Luĉio, tre konata kanto de la napola muziko, kaj Manno Montanna esperantkantis Halelujo-n, mondkonatan muzikaĵon de Leonard Cohen. Ambaŭ sin prezentis ludante gitaron.

Sub la kunordigo de César Dorneles Soares, en konversacia rondo portugallingva, oni disvolvis la ĉeftemon La ĝojo esti esperantisto. Kiasence Esperanto estas instrumento por pli da ĝojo en nia vivo? Kion ni povas fari, kiel E-komunumo, por intensigi tian feliĉigan senton?

Por fini, Miguel Rocha Bento respondecis pri la Retrospektivo

de la Jaro - Biblioteko kaj Jarkotizoj. Por GEA, 2019 estis jaro i.a. de reorganizado de ĝia biblioteko en nova sidejo, aranĝo de tri Esperantokursoj - baza, meza kaj progresiga - en du tagoj de la semajno, krom realigo de nova eldono de nia regiona renkontiĝo.

Estas ĝojiga la revivigo de la Gaúča Renkontiĝo de Esperanto. Malgraŭ la fakto, ke en ĝi partoprenas malgranda nombro da homoj (iomete pli ol 20 homoj en 2019), ĝi estas unika momento, en kiu la E-istoj de nia regiono povis kunfratiĝi kaj kultivi Esperanton, ĉefe pro tio, ke la sud-rio-granda movado ne plu povas kalkuli je sidejo, nur je spaco por siaj libroj, inter ili kelkaj raraĵoj. Sed fine, kiel diris Hector Hodler, "tio, kion ni emfaze nomas la 'triumfo de nia afero' ne estas io estonta kaj malproksima; tiu triumfo konsistas el aro da ĉiutagaj konkretaj sukcesetoj nun realigeblaj. Esperanto 'triumfas' ĉiufoje kiam ĝi servas al iu." ■



Paulo Sergio Viana



Unu el niaj plej aktivaj verkistoj, Paulo Sergio Viana havas interesajn ideojn kaj scias efektivi ilin. Per intervjueto en kiu li sciigas al ni sian produktivan agadon por literaturo, ni inaŭguras novan rubrikon por la legantoj de Brazila Esperantisto.

Kiam vi komencis interesiĝi pri tradukado?

Mi eklernis Esperanton kiam mi estis 12-jara. Jam de tiu tempo mi eklegis brazilan literaturon, komencante per Monteiro Lobato. Tuj poste mi ekkonis la verkojn de Machado de Assis, kaj ĉi tiu estis tute rava kampo por mi. Komprenoble, mi tuj konstatis, ke la mondo apenaŭ konas nian geniulon. Ankaŭ la tutmonda Esperantistaro. Esperanto estas do bela ponto por konigi nian geniulon al alilandaj, alikulturaj legantoj. Jen unu el la plej brilaj celoj de nia lingvo. Kaj mi komencis mian planon: kiam mi iom pli profunde regos la lingvon kaj la tradukarton, mi Esperantigos almenaŭ kelkajn el la ĉefverkoj de Machado de Assis.

Kiujn librojn vi jam tradukis?

Mi jam tradukis: “La Alienisto” (eldonis Fonto), “Postmortaj Rememoroj de Brás Cubas”, “Dom Casmurro”, “Esav kaj Jakob” (eldonis EASP) - de Machado de Assis. Ankaŭ kelkajn liajn rakontojn, kiuj partoprenas en du kolektoj:

unu persona, alia kun mia amiko Francisco Wechsler. Krome, mi persone publikigis broŝureton, kiu enhavas version de “La homo, kiu parolis la javan lingvon”, de Lima Barreto. Kaj de José Saramago (post persona kontakto kun li per la reto, post kiu li malpostulis aŭtorajn rajtojn!), mi tradukis “Rakonto pri nekonata insulo”. En tute alia kampo, mi tradukis la spiritisman verkon “Laboristoj de la Eterna Vivo”, Chico Xavier/Andreo Ludoviko, eldonitan de Societo Lorenz.

Pri kio vi laboras nuntempe rilate al literaturo?

Nuntempe mi okupiĝas pri publikigo de miaj propraj originalaj tekstoj. Mi jam publikigis kolekton da rakontoj “La Nigra Birdo kaj aliaj rakontoj”, kaj baldaŭ aperos nova rakontaro. Krome, EASP eldonis ankaŭ mian kolekton de artikoloj “Al ĉiu tago, ĝia legaĵo”. Mi pensas ankaŭ pri du samtemaj noveloj en unu volumeto. Kaj ankaŭ pri poemaro. Se mi ankoraŭ havos forton, mi ŝatos krome traduki la lastan romanon de Machado de Assis, “Taglibro de Aires” (“Memorial de Aires”).

Kredeble vi taksas alte la rolon de literaturo. Kiu estas viaj ideoj pri ĝi?

Mi pensas, ke literaturo estas unu el la pilieroj de kulturo, kiu ajn kulturo. Ankaŭ en Esperanto. En tempo de amasa uzado de interreto, ŝajne la homoj iom neglektas nian literaturon. Tamen, legi librojn estas tute alia mensa laboro ol legi mesaĝojn aŭ revuojn. Mi tute ne kontraŭas la mirindan interreton, kiu interalie multe helpas nuntempe por la diskonigo de Esperanto. Sed legi librojn estas la fundamento, la garantio, ke ĝi vere kreskas kiel kulturlingvo.

Mi pensas, ke nia movado devus starigi programon por publikigo de brazilaj literaturo (ne nur klasika) en Esperanto. Ni povus ekzemple organizi ian “Klubon de la Libro”, en kiu membroj antaŭpagas siajn ekzemplerojn, ricevotajn post la eldono. Ankaŭ la ebleco de virtualaj libroj estus konsiderinda. Mi bone komprenas, ke mankas homfortoj inter ni, sed mi petas: rigardu la laboron de Eldonejo Lorenz, en ĝia neneŭtrala kampo. Ĉu ankaŭ la neŭtrala movado ne povus labori simile? ■



Kiel plibonigi vian prononcon

Jen kelkaj trukoj por fari vian elparolon pli klara kaj belsona

Cícero Soares

Nova esperantisto sen granda sperto internacia povas fojfoje malŝati akĉenton tro fortan de eksterlandanoj. Banala ekzemplo estus la tro gorĝa R el kelkaj lokoj en Eŭropo:

MI DEZIĤAS (Mi deziras), NI IĤAS (Ni iras) ktp.

Malgraŭ tio, ke toleremo ĉefrolas inter ni, la diligenta esperantisto bezonas pli rigoran sintenon rilatan al la propra elparolo, cele al pli bela kaj pli klara prononco.

Inter la mispaŝoj farataj de brazilaj parolantoj elstariĝas la troa nazaligo de ĉiu vokalo apud literoj M aŭ N.

Brazilanoj kutimas elparoli:

*Mi bãnos mĩ (Mi banos min)
Esperãto (Esperanto)
Ŝi kãtas bele (Ŝi kantas bele)*

Gravas konscii pri tia karaktero. Laŭ PIV, "oni ne devas pli nazaligi la unuan silabon de 'lando', ol tiun de 'lano'".

EVITINDAJ KAZOJ

Tamen, oni speciale devas eviti nazaligon en du okazoj.

Unue, kiam ĝi kaŝas la literon M aŭ N.

Ĉu KĀPO estas KAMPO aŭ KANPO?

Ĉu KŌFORTO estas KOMFORTO aŭ KONFORTO?

Por mildigi la problemon, vaste uzu la buŝon, klare elparolante la sonon M aŭ N. Kunigu la lipojn por eligi la sonon M, kaj nur poste vi iru al la alia silabo:

LAM...PO.

Simile, por akcenti la sonon N, lange tuŝu la malantaŭon de la supraj dentoj, antaŭ ol ataki la postan silabon:

LAN...DO.

Konsciiĝu pri la erareto kaj trejniĝu tiucele dum babiladoj.

Ekzistas dua okazo de nazaligo aparte nenecesa: kiam ĝi estas facile evitebla! Ni klarigu: kelkaj vortoj tiaj, kiel: TROMPAS, SANKTA, LAMPO, SEPTEMBRO, DENTO, VINTRO k.a., ĝenerale vere portas iom da malfacilo al brazilanoj.

Sed vortoj kiel: VENAS, TEMAS, POMO, MATENO, AMAS, LIMO ktp., tute ne enhavas malfacilon por ĝusta prononco. Nur malatento, kutimo aŭ maldiligento povas kaŭzi fuŝitan elparolon en tiuj kazoj.

Sufiĉas iom trejniĝi. Eldiru laŭte la sekvajn parojn, sed certiĝu, ke la unua silabo de ambaŭ vortoj sonas sammaniere:

BALO – BANO	SATAS – SAME
BELA – BENO	TEO – TEMO
ĈIPA – ĈINO	LITRO – LIMO
KOTO – KONAS	POETO – POMO
PUTO – PUNI	FUĜI – FUMAS

KAJ EN ESPERANTO KAJ EN LA PORTUGALA

Alia malbeliga trajto malbeligas ankaŭ la portugalan mem! Tio okazas, kiam oni enŝovas vokalon neekzistantan inter du konsonantojn. Ekzemple:

Vamos substituir	(subs-ti-tu-ir)
Meu adevogado	(ad-vo-ga-do)
Que abissurdo!	(ab-sur-do).

Sama influo kreas en nia Esperanta elparolo malbelaĵojn tiajn:

<i>equizistas</i>	<i>(ek-zis-tas)</i>
<i>kontáquitas</i>	<i>(kon-tak-tas)</i>
<i>rêguino</i>	<i>(reg-no)</i>
<i>protêquitas</i>	<i>(pro-tek-tas)</i>
<i>quivâncam</i>	<i>(kvan-kam)</i>
<i>ôfite</i>	<i>(of-te)</i>
<i>quivar</i>	<i>(kvar)</i>
<i>quivin</i>	<i>(kvin)</i>
<i>dêqui</i>	<i>(dek)</i>
<i>sêpi</i>	<i>(sep)</i>
<i>sêdi</i>	<i>(sed)</i>
<i>ispetsiala</i>	<i>(spe-ci-a-la)</i>

Konscii pri tia difekto jam estas duono de la laboro al progreso.

LA MALFACILA SCIADO

Pri la ofta faligilo SCII mi havas specialan rekomendon. Ekzerciĝu eldirante la sekvajn vortojn per unura voĉa frapo ĉe la unua silabo:

CARO (tsa-ro), CERBO (tser-bo), CICO (tsi-tso).

Post tiu ekzerciĝado, elparoli MI SCIAS ne portos problemon: apogu la literon S de SCI sur la vokalon ĝenerale ekzistantan antaŭ la tikla vorteto. Ekzemple: MI SCIAS (mis...), LA SCIO (las...) ktp. Nur post elparolo de tiu unua parto, vi ataku la sekvan CI (tsi), laŭ la ekzerco antaŭa:

Mi scias (MIS-TSI-AS)
Paŭlo scias (PAŬ-LOS-TSI-AS)
Li ne scias (LI-NES-TSI-AS)
La scienco (LAS-TSI-EN-TSO)

Vi rimarkos, ke ekatenti prononcado montriĝos senrevena vojo! Ju pli vi malfermos la orelojn al klaraj prononcoj, des pli ĝene sonos al vi malbelaj aliulaj kutimoj. Vi komencos rimarki la S kiu iĝas Z:

Ŝi estazalta (Ŝi estas alta)
Mi devaziri (Mi devas iri)
Li volazuzi (Li volas uzi)

Aŭ la S kiu iĝas Ŝ:

Mi eŝtaŝ (Mi estas)
Li ŝtudaŝ (Li studas)
La laŝta fojo (La lasta fojo)

Per atentaj oreloj kaj praktikado diligenta, vi pli kaj pli bele rafinos vian elparolon. ■

En la Reto



BILDKARTOJ

Ĉu vi trovas retmesaĝojn tro malvarmaj? Ĉu vi ŝatus ricevi bildkartojn el diversaj landoj, surskribitajn mane, per simpla globkrajono, kun amika mesaĝo en Esperanto? Se jes, aliĝu al la Esperanto-Poŝtkruciĝo kaj interŝanĝu poŝtkartojn kun la tuta mondo.

<http://bildkarto.wixsite.com/bildkarto>



VINILKOSMO

La plej sukcesa muzikentrepreno kiu produktadas ekskluzive Esperantajn bandojn kaj artistojn havas paĝaron, kiu disponigas riĉan enhavon. Tie vi povas traserĉi laŭ stilo, spekti videaĵojn, elŝuti bitajn kantojn (MP3-formate) kaj enmiksiĝi en tiun vastan muzikan kulturejon.

www.vinilkosmo-mp3.com/eo/



UEA.FACILA

Tiu speciala paĝaro subtenata de UEA celas komencantojn. Ĝi enhavas ne nur aron da artikoloj mallongaj kaj en facila lingvonivelo, sed ankaŭ filmetojn kaj anoncojn de E-aranĝoj de la venontaj 90 tagoj. Ĝin redaktas la verkistino Anna Löwenstein.

<http://uea.facila.org/>



Poésie en Liberté (Poezio Tut'libera)



Ekzistas internacia konkurso lanĉita en 1998 ĉe la franca lernejo Lycée Henri-Wallon d'Aubervilliers, en Parizo. La grupo de instruistoj celis uzi Interreton, kiu sukcesas rompi landlimojn, por demokrateca alparolo al la mondo. Kaj ili elektis la poezion kiel idealan ilon.

Ekde ĝia ekesto, la iniciato Poésie en Liberté (Poezio Tut'libera) pli kaj pli iĝas prestiĝa,

kun libroforma publikaĵo de lernantoj inter 15- kaj 25-jaraj el diversaj partoj de la mondo. Rimarkindas, ke ĝi havas specialan branĉon por Esperanta poezio, originale verkita en nia lingvo.

Dum la tuta jaro estas multaj aranĝoj por la konkurso, kiu havas subtenon de la ĉefaj edukaj kaj kulturaj francaj instancoj. En Novembro 2019 la juĝkomisio invitas al Parizo ĉiujn kvalifikitajn francajn partoprenantojn, - kaj

nur la unuajn premiitajn eksterlandanojn.

En 2019 la brazilanoj fieras pri la partopreno de Miguel Rocha Bento, el Porto-Alegro (redakciano de BE), kiu gajnis la unuan premion per la belega poemo "Jardeko".

Brazila Esperantisto gratulas la junan talenton, kaj atendas pli da fruktoj el lia plumo.





En 2015, dum mia unua tago en Florenco, kiun mi ankoraŭ ne konis, mi estis traŭranta la ĉirkaŭaĵojn de Piazza della Repubblica, kune kun tri vojaĝkunuloj, venintaj el Piazza della Signoria kaj ties beleco, vera muzeo liberaera pri renesanca arto. Krepuskis. Subite ni ekvidis sinsekvantajn konstruaĵojn tiel belajn, ke ili ravis nin pli kaj pli en momento de granda emocio kaj estetika ĝuo. Mi komente ekkriis: *Estas beleco kiu doloras!* Miaj geamikoj tute konsentis kun mi. *Beleco kiu doloras!*

Pasis la tempo kaj kurioze kiam mi estas ekleganta la romanon portugallingve *A Descoberta da Escrita (La Malkovro de la Skribo)*, de la norvega verkisto Karl Ove Knausgård, la sama esprimo estis eldirita de la protagonisto (la propra aŭtoro...) okaze de vojaĝo lia al unu el la urboj de Norvegio.

Mi legis raportaĵon antaŭnelonge en la revuo *Piauí* pri la degelo en Gronlando, en kiu vivas nur ĉ. 60 mil homoj. Preskaŭ triono el ili loĝas en Nuuk ("La Duoninsulo" en la gronlanda lingvo), fondita komence de la 18a jc de Hans Hegede, norveg-dana misiisto. Kurioze, kiam li alvenis al la granda insulo, li eltrovis, ke ne ekzistas vorto por "pano" en la lingvo de la indiĝenoj ĝuste pro tio, ke ili ne sin nutris pere de ĝi. Sekve kiam Hegede pensis traduki en la gronlandan lingvon la "Patron Nian", la plej konatan preĝon de la kristanismo, unu el la versoj fariĝis tiel:

"Nian fokon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ".


Onidire iam Napoleono Bonaparto, la franca imperiestro, parolis kun juna itala damo. Li demandis al ŝi: *Tutti gli italiani danzano si male? (u iuj italoj dancas tiel malbone?)* kaj ŝi tuje respondis: *Non tutti, ma buona parte (Ne iuj sed "buona parte",* tio estas, "konsiderinda parto", farante vortludon en la itala).

En la revuo *Quatro Cinco Um*, verkisto Leonardo Fróes verkis recenzon pri la libro *A vida secreta das árvores (La sekreta vivo de la arboj)*, de Peter

Wohlleben (eldonejo Sextante). Mi trovis la artikolon vere atentokapta ĉar ĝi montras pere de informoj enhavataj de la libro, kaj baze de liaj propraj spertoj kiel posedanto de bieneto en montaro de la ŝtato Rio-de-Janejro, ke la arboj pere de siaj radikoj difinas strategiojn por postvivi, kaj kreas "defendreton antaŭ la eksteraj minacoj".



Leonardo rakontas, ekzemple, ke en sia bieneto dum pli ol 40 jaroj li atente observas la "mirindaĵojn realigitajn de bestoj kaj plantoj, ekzemple arbon, kiu naskiĝis ĉe la bordo de rivero. La kavaĵo sur kiu ĝi kreskis kaj fiksiĝis estas abrupta kaj ne estas sufiĉe solida. Inundo povus facile elradikigi kaj fortreni ĝin en la riveron." Antaŭzorge la arbo "sciis" kiel fronti la minacon. Kiam ĝi estis preskaŭ du metrojn alta, ĝi ekmodifis la strukturon de sia rektforma trunko, kurbiĝante poïome "kvazaŭ ĝi estus kaŭĉuko", kun la intenco alkrōĉiĝi al alia arbo "pli granda kaj firme staranta en seka loko de la bordo. Post kiam ĝi "perceptis", ke ĝia vivo ne plu frontas danĝeron, ĝi denove kreskis rektlinie." ■



NIA LITERATURA PANTEONO

Cícero Soares

En 1955 aperis poemvolumo "Kontralte", en kiu debutis la granda brita verkistino Marjorie Boulton (1924-2017).

Omaĝe al ŝia verkaro, kaj ankoraŭ kondolence pro ŝia neantaŭlonga forpaso, ni republikigas la malferman poemon de tiu libro, en kiu la poetino sin montras per tre interesa bildo. Laŭ Norda Prismo samjara:

Ŝi estas tri: digna lektorino, en kies kontakto ŝi uzas la vorton "digna" en memironia senco. La lektoreco signifas eksteran aspekton, nigran robon, konstantan problemon de sincera animo, kiu ne volonte ŝajnigas superecon rilate al siaj junaj fratinoj (...) La tria homo estas la poetino, kiu "per arta disciplino - observas ilin ambaŭ kaj komentas". Tio estas: komentas la lektorinon en la nigra robo kaj en la instruista pozo kaj provas komenti la "virinon simplan en dezir' tortura".

La traduko de Cícero Soares en la portugalan penas kapti tiujn ideojn, redonante la riĉan riman kaj ritman teknikon de la originalo.

Marjorie Boulton: Kontralte. Originala poemaro. - Antaŭparolo de William Auld. - Kovrilo de John Hartley. - Portreto de la aŭtorino. - Stafeto, Belliteratura eldonserio, 5. - J. Régulo, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955. - 16x22,5 cm. - 288 paĝoj.



La triopa mem

Mi estas tri. La digna lektorino
kun la krajon' kritika libron legas.
En nigra robo, pri la origino
de l' dramo primitiva ŝi prelegas.

Dume, en koro, primitiva dramo
okazas, ĉiam freŝa kaj terura;
sub nigra robo brulas nun pro amo
virino simpla en dezir' tortura.

La lektorino pensas. La virino
baraktas, krias, nur angoron sentas.
Sed la poet', per arta disciplino,
observas ilin ambaŭ, kaj komentas.

O Triplo Eu
(Trad.: Cícero Soares)

Eu sou é três. Literata durona
com a caneta crua e traço vivo
de uniforme negro leciona
as origens do drama primitivo.

Enquanto isso n'alma outro drama
que é primitivo e nunca envelhecido
faz ferver de amor sob o vestido
a moça simples de desejo em chama.

A professora pensa, o olhar tranquilo.
A moça geme - o ardor não pega leve!
Mas a poeta é arte e estilo:
Observa ela as duas... e escreve.

BARBARAJ SONOJ KAJ SONETOJ: LA CIGNOKANTO DE L' POETO

Fernando Pita

Mi ĉiam diras al iu ajn, ke Geraldo Mattos estas unu el la plej gravaj homoj jam vivintaj en Esperantujo: krom profesoro kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto, tradukisto, romanisto, dramisto, lingvisto, aŭtoro de diversaj instrumentoj (pri Esperanto, la portugala kaj la latina), Geraldo ankoraŭ estis unu el la plej bonaj el la ĉiutempaj Esperantaj poetoj. Li estis unu el tiuj - en ajna lingvo maloftaj - kiuj ĉiam kapablis prezenti novaĵojn, kaj en la formo kaj en la enhavo mem de siaj poemoj.

Subite forpasinta en 2014, de tiam la nomo de Geraldo Mattos (precipe la poeto kaj la lingvisto) kuŝas en kvazaŭa limbo, tute ne meritita de homo kiu tiom faris por nia, ne nur nacia, sed tutmonda, movado. Kaj, ĉar mi taksas tion grava maljusteco, mia eta kontribuo por iom ŝanĝi tiun bildon estas prezenti al nia legantaro ion de lia poezia vervo.

Tamen, antaŭ ĉio, ni devas agnoski, ke en la korpo de Geraldo Mattos kunvivis almenaŭ du homoj: la poeto kaj la lingvisto. Kaj ke tiu kunvivado ne ĉiam estis paca: dum jaroj la poeto estis sufokita de la lingvisto, kaj nur tre sporade manifestiĝis. Sed, en la jaro 2000 ili laŭvide lernis kunvivi pace: la lingvisto komprenis, ke, sen la poeto, la tuta vivo de Geraldo sekiĝos; kaj la poeto siavice permesis ke liaj poemoj fariĝu esplorkampo por la lingvisto. Tiel naskiĝis Barbaraj sonoj kaj sonetoj, lanĉita kiel la 28-a numero de la serio Fonto-kajeroj, kaj kiu estis la lasta poezia libro de Geraldo Mattos.

LA POETO KAJ LA LINGVISTO

En tiu verko, la poeto elmontras, ke neniel pezas la preskaŭ 50 jaroj inter liaj unua kaj lasta libro: Geraldo daŭre restas mense juna, verve lerta, vive pasia. Tamen, en la poemoj manifestiĝas ankaŭ la lingvisto, kiu alportas novaĵojn rilate al almenaŭ tri vidpunktoj: la versa, la gramatika kaj la vortproviza strukturoj. Tiel oni povas aserti, ke, se estas komuna trajto en la kontribuoj de la lingvisto, ili ja povas esti nomataj "kontrolita eksperimentismo".

Do ni parolu pri tiuj kontribuoj, komencante de la vortprovizo. Menciendas ke Barbaraj sonoj kaj sonetoj estas la ununura verko de Geraldo lanĉita post la febro kaŭzita de La Bona Lingvo (1989), verko de Claude Piron, kiu okazigis veran revolucion en la sinteno de (granda parto) de la esperantistaro rilate

al la lingvo mem. Kaj tie komenciĝas la unua disputo inter poeto kaj lingvisto: por nura lingvisto, la pironaj tezoj estas vera frandaĵo! Tiel, eĉ se Geraldo neniam estis eksplicite defendinta la ideojn de Piron, lia sinteno rilate al tiu vera fenomeno ja klaras: la lingvisto bonvenigas ilin, kondiĉe ke ili ne fariĝu nova fanatika sekto kiu povu, ekzemple, sufoki la poetojn. Tiel, la poeto Geraldo ne hezitas meti, flanke al flanke, bonlingvaj kunmetitaĵojn kaj erudiciajn vortkonstruojn: li ankaŭ eĉ ne timas krei novajn vortojn, se li konsideras tion taŭga por ke, tiamaniere, vibra kaj resona verko naskiĝu. Do oni povas diri, ke se la poeto cedas al la lingvisto momenton por elmontri sin kapabla servi al la poezio, li same ne permesas al li, ke li okupu pli da spaco ol necese, kaj eĉ tiu cedo okazas sub unusola - ja la ununura - sinpravigo: la lingvo ekzistas por servi al la homo, kaj ne la kontraŭo. Kaj ĉar la poeto estas - pli ol ĉiu alia - absoluta majstro de la lingvo, li uzas ĝin kiel ilon por sia vervo, kaj tute ne por elmontri siajn konojn de nia gramatiko.

LA POETO KAJ LA GRAMATIKISTO

Sed la poeto ne estas tiom diktatoreca: rilate al gramatiko, li fariĝas pli tolerema. En la Esperanta gramatiko estas demando preskaŭ neniam sufiĉe esplorita aŭ bone traktita, kiu estas: "kiuj prepozicioj rajtas akompani infinitivajn verbojn?". Li elturniĝis el tiu demando - kiu ja turmentas Esperantajn poetojn, ĉar ĝi rekte rilatas al la metriko kaj al diversaj (novaj) ebloj de frazkonstruoj - kaj elmontris, ke, fakte, tiuj reguloj estas - denove el nurpoeta vidpunkto - plejparte simpla balasto. Kaj ĉi-momente la lingvisto Geraldo eĉ surtabligas alian demandon, pri kiu Piron ne faris mencion: pli grave ol plendi pri uzado de tia aŭ alia vorto, estas ke oni detale solvu la ankoraŭ daŭrantajn "nebulajn punktojn" de la Esperanta gramatiko, tiujn, por kiuj ĝis nun neniu sukcesis atingi vere kontentigan solvon. Tiamaniere, la lingvisto Geraldo proponas al la poeto etan kaj simpligan (kaj pro tiuj du kialoj pli efikan) revolucion: tiu laŭplaĉe tordu la Esperantan gramatikon kaj uzu prepoziciojn antaŭ ĉiuj infinitivaj verboj, kiam kaj se necese.

Tion farante - li mem tion agnoskas - li eltrovas drastan solvon al tiu tikla punkto, kaj li denove

subigas, ĉi-foje gramatikon, al la intencoj de la poeto. Tamen, la lingvisto Geraldo estas saĝa homo: li scias, ke la ebleco de l' uzo ne igas la uzadon deviga, kaj eĉ se li al si permesas uzi ĉiujn prepoziciojn antaŭ la infinitivoj, la fakto estas, ke li nur pogute uzas tiun rimedon: en la libro ja malmultas la ekzemploj.

Pri la strukturo de la versoj, oni devas reveni al la titolo mem de la libro, en kiu la poeto distingas inter sonoj kaj sonetoj. Tie estas alia vortludo, ĉar fakte la sonoj estas ja sonetoj (la versa strukturo kiun Geraldo pli profunde regis, ĉieĉeesta en preskaŭ ĉiuj liaj libroj), kaj "sonetoj" estas nur diminutivo de "sonoj".

Oni same devas konsideri, ke, ĉar li jam estis verkinta kvar librojn (Arĉoj, Ritmoj de Vivo, La libro de Nejma kaj La libro de Adoro), en kiuj enestas nur sonetoj, Geraldo jam majstre regadis ĉiajn tradiciajn strukturajn kaj rimajn eblojn de tiu versmodelo; estis do tempo eksperimenti novajn manierojn soneti: kaj tion li faris per kunfando de tri tradicioj: la unua, tiu de la soneto mem, tio estas, la versa strukturo inaŭgurita de la Renesanca italo Francesco Petrarca; la dua, tiu de la Moderneco, kiu alportas plenan liberecon en la temaro kaj la eblon forigi rimojn. Kaj jen la unua ŝoko de la "barbaraj sonoj", ĉar certe multaj homoj pensas, ke senrimaj versaĵoj estas vera atenco al bona poezio (kiun ili ĝenerale difinas kiel "arto bele paroli pri belaj aferoj"), sed malesto de rimo estas tradicio en preskaŭ ĉiuj homaj kulturoj - escepte de la okcidentaj, post la Mezepoko - tiel oni rajtas cerbumi, ĉu tiu malesto ne estas pli internacieca sinteno antaŭ la poezio, pli esperenda de esperantisto ol nura kopiado de eŭropecaj formoj?

LA POETO KAJ TEKNIKISTO

Fine, jen la tria kontribuo de la lingvisto, sur kiu kuŝas la vera novigo alportita de la poeto Geraldo: sub tiu unuavide barbara soneta formo, Geraldo kaŝas versojn konstruitajn laŭ la antikva klasika (tio estas helena kaj latina) strukturo, en kiu rimo ja estas nura neglektenda bagatelo, ĉar multe pli gravas teni konstantan, sed varieman ritmon en la legado. Per tio Geraldo fine konkludas, ke la "barbareco" estas malvera, ĉar la poeto silente sed lerte konstruas ponton inter la Antikveco, per la vera sed kaŝita strukturo; la Renesanco, per la laŭpetrarka soneta strukturo; kaj la Moderneco, pro la temara libereco, kiu, ĉar temas pri Geraldo, preskaŭ ĉiam devenigas am-erotikajn versojn.

En la dua parto de la libro, la "barbaraj sonetoj", oni trovas mallongajn poemojn konstruitajn laŭ tute libera, kaj pro tio pli varia, formo. Tiuj "sonetoj" estas konkludigaj pruvoj pri tio, ke la sindediĉo de l' poeto al sonetfarado neniel ŝuldiĝis al ia nekapablo verki alistile, sed al pli decida kaj konscia deziro.

Komprenoble Geraldo Mattos ne atendis, ke liaj Barbaraj sonoj kaj sonetoj fariĝu lia cignokanto, tamen, fortoj pli povaj decidis pri tio. Onidire ankoraŭ estas multaj neeldonitaj verkoj. Se ili ja ekzistas, mi do esperas, ke ili iam venu al la lumo, kaj la Esperanta mondo povu rekoni la valoron de tiu brazila poeto. Kaj, finfine, mi same esperas ke, post legado de tiu ĉi mia teksto, mia ebla leginto ne lasu sin timigi de miaj analizoj, sed, scivolema pri la libro, li decidu mem tuj esplori ĝin, kaj ke, dum li ĝuas la mirindan poezian vervon de la aŭtoro, li mem malkovru ne nur novajn vidpunktojn, sed ankaŭ la gravecon kaj belecon de tiu verko, kune farita kaj de poeto kaj de lingvisto. ■



BEL@Butiko

www.belabutiko.esperanto.org.br

Barbaraj sonoj kaj sonetoj.
Geraldo Mattos
80 p.
Eldonejo Fonto,
Chapecó, 2000.

Ordinara prezo:
R\$10,00
Speciala prezo:
R\$5,00

LETERO DE NORDORIENTO

Dum Pernambuka Simpozio de Esperanto, okazinta en Novembro 2017, oni multe diskutis pri grava karaktero de la nuntempa movado. La ideoj kiuj floris tiam ricevis atenton de la revuo Esperanto, de UEA, kiu aperigis artikolon de Wendel Pontes pri la temo. La objekto de la diskutado, tamen, daŭre restas aktuala, tial BE trovis grave publikigi la dokumenton, kiu resumas tiujn konsiderojn.

Malgraŭ la evidenta krizo kiu sieĝas la plejmulton de la Esperantaj asocioj, ilia elteno estas fundamenta al la fortikiĝo de nia loka Esperanta movado. Tial, diversaj streboj farendas por konservi la fizikan kaj intelektan enhavon de tiuj asocioj.

La asocioj, iliaj anoj kaj estraranoj devas ekkonscii pri la neceso uzi ĉiajn komunikrimedojn kaj retajn komunumojn eblajn celante la disvastigon de la faritaĵoj de tiuj organizoj, same kiel por faciligi la integriĝon inter la esperantistoj, aniĝintaj al ili aŭ ne.

La asocioj bezonas oferi aktivaĵojn celantajn la publikon kiu devenos el la retaj Esperanto-kursoj, kiel tiu oferata de la poŝtelefona aplikaĵo Duolingo.

La esperantistoj devas alproksimiĝi kaj aniĝi al la lokaj, regionaj kaj naciaj Esperanto-asocioj, tiel fortikigante ilin, kunlaborante por la apero kaj subteno de ĉeestaj kaj regulaj kunvenoj. La partopreno je tiuj ĉeestaj grupoj estas rimedo pli ol efika por la disvastigo de la Esperanta kulturo, fortikiganta la inkludan senton al la komunumo kaj multe kontribuanta al la elvolviĝo de sociaj ecoj, kiu

ne okazas same kontentige nur per retaj komunumoj.

La aktivuloj kaj reprezentantoj de la ŝtatoj pligrandigu la integriĝon inter si, por disvolvi la fortikigon kaj establon de pli foraj grupoj. Okaze de konstato pri la neeblo teni lokan asocion, oni devas ebligi:

a) Agojn por la malfermiĝo de oficejoj kiuj apartenas al aliaj institucioj jam regulaj, kiam estas komuna intereso por daŭra laboro; b) Agojn partnerajn kun regulaj institucioj por okazigo de eventoj aŭ porokazaj kursoj, kaj c) Okaze de neeblo pri supraj alineoj a) kaj b), instigon al partopreno ĉe neformalaj grupoj, kiel Poliglota Klubo.

Oni proponas al Brazila Esperanto-Ligo la kreon de portugallingva kompendio kies enhavo estu simila al tiu disponebla en la retpaĝo de la Aktivula Akademio de TEJO, celanta la trejnadon kaj la aktivismon esperantistan. Tiu kompendio destiniĝos al brazilaj esperantistoj kaj entuziasmuloj kiuj ankoraŭ ne estas fluaj parolantoj.

Subskribas ĉi tiun leteron:

Aristóphio Alves - ano de Alagoana Asocio de Esperanto (AL) kaj brazila sekciestro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Carlos Oliveira - ano de Esperanto-Klubo Kariri, en Norda Juazejro (CE)

Cícero Gabriel Soares - direktoro pri instruado de Bahiana Esperanto-Asocio (BA)

Edson Ido - ano de Esperanto-Klubo Kariri, en Norda Juazejro (CE)

Fernando Shayani - esperantisto de João-Pesoo (PB)

Juliana Evandro - tiama prezidanto de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO)

Lívio Lima - administra financa kunordiganto de Fundação Sistêmica (PB)

Núbia Alves Sobral - prezidantino de Alagoana Asocio de Esperanto (AL)

Rodrigo Tavares - reprezentanto de Potigvara Esperanto-Asocio (RN)

Wendel Pontes - prezidanto de Pernambuka Esperanto-Asocio (PE)

LINGVA LUDO

Nia Esperanta Proverbaro estas riĉa trezoro de esprimoj, parolturnoj kaj kulturo. Per ĝi oni povas facile lerni modelan sintakson kaj pligrandigi sian vortprovizon.


Sube estas kelkaj proverboj pri la temo FELIĈO.

Sed, ĉar sen laboro ne venas oro, kompletigu la mankantajn vortojn de ĉiu, kaj ĝuu ilian saĝecon.

Vortmenuo:

akiras - amboso - danci - edziĝas - esperu - flue - forgesas - fratoj - koko -
krevas - leĝon - malfeliĉo - prenanto - riĉa - sinjoro - venas

- 1) Al feliĉulo eĉ _____ donas ovojn.
- 2) En feliĉo ne fieru, en malfeliĉo _____.
- 3) Facile estas _____, se la feliĉo kantas.
- 4) Feliĉo fierigas, _____ saĝigas.
- 5) Feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ _____.
- 6) Feliĉo _____ ne obeas, subite naskiĝas, subite pereas.
- 7) Feliĉo venas gute, malfeliĉo venas _____.
- 8) Feliĉo vezike sin levas, sed baldaŭ falas kaj _____.
- 9) Kiu malmulte deziras, feliĉon _____.
- 10) Kiun feliĉo subtenas, al tiu mem ĉio _____.
- 11) Kontentulo estas pli feliĉa, ol homo plej _____.
- 12) Malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun _____.
- 13) Multaj svatiĝas, feliĉulo _____.
- 14) Pli feliĉa estas donanto ol _____.
- 15) Pli feliĉa estas martelo insultata, ol _____ kompatata.
- 16) Pli feliĉa _____ sen have, ol riĉulo sed sklavo.




Solvoj:
1. koko 2. esperu 3. danci 4. malfeliĉo 5. forgesas 6. leĝon 7. flue 8. krevas 9. akiras 10. venas 11. riĉa
12. fratoj 13. edziĝas 14. prenanto 15. amboso 16. sinjoro


Scenarij
el la 1-a



BRAZILA RETA ESPERANTISTA JUNULARA KONGRESO | 12-a ĝis 16-a de aŭgusto 2020




Luana de Mello



Querino Neto




Emerson



Jonny M



Euleax




Lucas



Allan




Renata Ventura



Leandro Abrahão




Wendel Pontes





Rafael



Veronika



Brunê

Farita per:  
Fechamento autorizado. Pode ser aberto pela ECT

Remetente:
Liga Brasileira de Esperanto
SDS, Ed. Venâncio III - sala 303
70393-902 Brasília-DF

Organizis:

Apogis:



MONDAFEST 2020
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO

Spektu la programerojn en
youtube.com/jutubejo



esperanto.org.br